Heinrich Heine,

# Tombosentenco

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kie estos ripozejo
lasta de migranto mi?
Ĉu sub palmoj en forejo?
Aŭ ĉe l´ Rejno sub tili´?

Ĉu enfosos min malpie
iu en dezerta land´?
Aŭ ĉu mi ripozos ie
en la sablo de marstrand´?

Tamen, min ĉirkaŭos ĉie
la ĉiel´ de l´ granda Di´,
steloj tie ĉi kaj tie
lampe ŝvebos super mi.

*Traduko de la Germana poemo "Grabspruch" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1993.*

*MR-261-1c / Arg-63-123 (2010-05-26 19:44:33)*

Heinrich Heine,

# Grabspruch

Wo wird einst des Wandermüden
letzte Ruhestätte sein?
Unter Palmen in dem Süden?
Unter Linden an dem Rhein?

Werd´ ich wo in einer Wüste
eingescharrt von fremder Hand?
Oder ruh´ ich an der Küste
eines Meeres in dem Sand?

Immerhin! Mich wird umgeben
Gottes Himmel, dort wie hier,
Und als Totenlampe schweben
nachts die Sterne über mir.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17).*

*MR-261-1c / Arg-63-122 (2003-10-26 01:05:12)*